

Atentu esperantistoj ! Okaze de kristnasko parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la mesaĝo de la Encikliko de Papo Johano 23-a *Pacem in terris*.

Unu el la plej gravaj okazintaĵoj de la jaro 1963 sendube estis la diskonigo dum la paskaj celebraĵoj de la encikliko *Pacem in terris*. La Papo de la paco, dank'al tiu grava dokumento, diskonigis mesaĝon ege aktualan, tio ĵus antaŭ sia morto.

Johano 23-a parolas en lingvo komprenebla ne nur de la katolikaro, sed de ĉiuj bonvolemuloj. Liaj asertoj ne baziĝas sur dogmaro de eklezio, sed sur kontroleblaj konstatoj. Pro tio lia mesaĝo renkontis grandan eĥon ne nur en la kristanaro, sed ankaŭ ekster ĝi. Kaj kiam la papo volas pli intime paroli al siaj eklezianoj, tiam li evitas la dirojn, kiuj povus elvoki la konfliktojn ekzistantajn inter la di-kredantoj kaj la ne-kredantoj. Almenaŭ tio estas mia impresio.

Mi eltiros hodiaŭ el tiu encikliko diversajn tekstojn, kiujn mi prezentas okaze de krisnasko, kiel temon de meditado. Mi sekvas la tekston de la esperanta traduko eldonita de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, menciante, ke la tradukisto, samideano Flammer, estas svisa pastro, kiu komencas esti konata tra tuta Esperantujo. Kiam lia traduko tro diferencas de la franca traduko de Lucien Guissard, tiam mi permesas al mi kelkajn korektojn, kiuj ŝajnas al mi necesaj.

Mi komence legos al vi aserton de Papo Johano 23-a, kiu ŝajnas al mi tre grava, kiam oni celas mondpacon : « *La homo rajtas, diras la papo, libere esplori la veron, libere esprimi kaj konigi siajn ideojn kaj laŭvere informiĝi pri okazintaĵoj.* » (Fino de la citaĵo).

Povu tiuj liaj vortoj naski pli tolereman interreligian kaj interpolitikan klimaton.

La citaĵo, kiun mi nun legos, ŝajnas eliri la buŝon de Mahatma Gandhi. Jen mi citas : « *Perforto neniam konstruis, sed nur detruis ; vekis pasiojn, neniam kvietigis ilin ; ĉiam amasigis malamon kaj ruinojn, neniam repacigis la kverelantojn ; ĝi ĉiam devigis partiojn kaj homojn, sur la ruinoj de sia malkonkordo, penegre rekonstrui ĉion.* ».

Tuta ĉapitro de tiu encikliko parolas pri la rajtoj kaj devoj de la homoj. Mi citos sufiĉe longan eron, kiun ni povus skribi kun oraj literoj sur la publikaj domoj, ĉar ĝi lumigas veron tro ofte forgesitan. Mi citas :

« *Al la homa rajto je vivo respondas la devo konservi la vivon ; al la rajto je hominda vivo respondas la devo honeste vivi ; al la rajto je libera esploro de la vero respondas la devo, ĉiam pli vaste kaj pli profunde penetri en la veron. En la homa socio al la rajto de unu ĉiam respondas la devo de alia : nome agnoski kaj respekti tiun rajton. Ĉiu vera homa rajto ja dankas sian devigan forton al la naturleĝo ; ĉi tiu donas la rajton kaj samtempe diktas la respondan devon. Kiu postulas sian rajton kaj forgesas aŭ malobservas sian devon, tiu detruas per unu mano, kion li konstruas per la alia.* »

En la fino de sia mesaĝo la papo parolas pri Unuiĝintaj Nacioj kaj ilia Deklaracio pri la Rajtoj de la Homo, kies 15-an naskiĝ-jaron ni ĵus celebris la 10-an de decembro. Mi citas Johanon 23-an : « *Ni opinias tiun Deklaron paŝo en la direkto de la ankoraŭ kreota jura kaj politika ordigo de la popolkomunumo.* »

Por la papo la homoj staras hodiaŭ antaŭ gravega tasko. Mi citas : « *La rekonstruo de la interrilatoj en la socio sur la bazoj de vero, justeco, karitato kaj libereco.* »

La papo proklamas la neceson starigi mondregistaron vere efikan. Pro tio liaj diroj estis tre laŭte salutataj de la mondfederalistoj. Mi legas du dirojn de la papo koncerne universalan potencorganon :

*« La socia bonstato de ĉiuj popoloj en nia tempo vekas problemojn, kiuj koncernas la tutan mondon. Ilin sekve nur povas solvi la publika aŭtoritato, kies potenco kaj strukturo kaj rimedoj estas same mondvastaj, kaj kies aktiveco estas tutmonda. La morala ordo postulas de si mem la starigon de universala potencorgano. Ĉi tiu universala potencorgano, daŭrigas la papo, kies aŭtoritato devas esti agnoskita en la tuta mondo kaj disponi pri la ĝustaj rimedoj por starigi la ĝeneralan bonstaton, povas esti realigata nur kun la interkonsento de ĉiuj popoloj kaj neperforte. »*

La papo avertas nin, ke tiun mondregistaron ni kapablos starigi nur se okazos ĝeneraligita kaj kontrolata malarmado. Povu lia averto esti aŭdata. *« Ni vidas, diras la papo, kun granda ĉagreno, ke en la ekonomie fortaj landoj estas fabrikataj teruraj militarmiloj, kaj ke por tio estas uzataj la plej granda spirita energio kaj multegaj materiaj valoroj. La sekvo de tio estas ke, dum la civitanoj de la koncernaj landoj devas porti pezajn ŝarĝojn, al aliaj landoj mankas la necesa helpo por povi ekonomie kaj sociale progresi. »*

Koncerne la kernarmilojn la papo diras : *« Kvankam tiu senekzempla armado nuntempe retenas la homojn komenci militon, oni tamen devas timi, ke la jam por militaj celoj faritaj kernprovoj, se ili ne estos ĉesigataj, grave povos endanĝerigi la vivon sur la tero. »* Tiu lia timo estas la timo de multaj atomfizikistoj kaj kuracistoj.

Mi finas per lasta citaĵo, kiu povus esti nia meditat-temo dum la fino de tiu ĉi jaro :

*« La totala forigo de la armado ne estas ebla, se oni samtempe ne atingas kompletan malarmadon ankaŭ en la spiritoj de la homoj. Ĉiuj devas unuanime kaj sincere kunlabori por ekstermi la militpsikozon. Tio postulas, ke la leĝo, sur kiu nun baziĝas la paco, estu anstataŭigata de tute alia leĝo : La vera paco inter la popoloj ne baziĝu sur ekvilibro en la armado, sed sur reciproka fido. Ni kredas, ke ĉi tio devas esti ebla. Temas ja pri afero, kiu estas racia, plej dezirinda kaj de plej alta utilo. »*

Okaze de kristnasko vi aŭdis Claude Gacond, nome de Svisa Kurtonda Radiostacio, paroli pri la encikliko *Pacem in terris* de Papo Johano 23-a.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-